

INFORMA

BOLLETTINO D'INFORMAZIONE

BULTENO



Bolonja Esperanto Grupo
Gruppo Esperantista Bolognese
"Achille Tellini 1912"

Via Avesella 16 - 40121 Bologna
tel-fax: 0516446675
gesperbo@iperbole.bologna.it
www.comune.bologna.it/iperbole/gesperbo
c.c.p. n°18231407

Jaro / Anno 60 – n. 3
Septembro/Settembre 2010

Redaktoro - redattore
Mario Amadei

PLENSUKCESA ITALA KONGRESO

de Mario Amadei

En la ĉarma mar-urbeto Lignano (Linjano) disvolviĝis la 77a Itala Kongreso de Esperanto (21-28.08.2010) kiun aliĝis 332 kongresanoj el 37 landoj, do oni povis konsideri ĝin internacia kongreso; ĝi estis rekordo de la lastaj pasintaj jaroj.

La Organiza Komitato aranĝis la programon kun vere riĉa enhavo: tre interesaj estis la kulturaj kaj muzikaj aranĝoj al kiuj partoprenis diverslandaj spertaj movadanaĵ aktivuloj kaj artistoj.

"Lingvaj rajtoj en la Eŭropa multkultura socio", estis La kongresa temo kaj diskutoj.

En la oficiala kongreso-malfermo, Renato Corsetti, IEF-prezidanto, bonvenigis la multnombrajn partoprenantojn kaj surtekis precipe pri la Centjariĝo de la Itala Esperanto-Federacio kiu ĝuste antaŭ 100 jaroj estis fondita en la urbo Florenco. La 20an de marto en tia urbo oni rememoris la eventon per interesa grava kunveno ĉe la prestiĝa kaj historia salono de "Palazzo Vecchio" (la urbodomo), kun la partopreno de aŭtoritatoj kaj kleraj prelegantoj (pri ĝi ni jam raportis en la junio-Inforna Bulteno).



77-a Itala E-Kongreso, la solena inaŭguro

Pri la kongresa temo prelegis Zlatko Tišljar, sekretario de Eŭropa Esperanto- Unio, kiu rimarkigis la mankon de komuna lingvo, kiel esperanto, necesas por kontraŭstari la uzadon de naciaj lingvoj kaj kulturoj.

Sekvis la salutoj de la fakaj italaj E-asociaj reprezentantoj kaj poste la multnombraj alilandaj reprezentantoj.

Je la konkludo de la kongresa inaŭguro, la kongresanoj starantaj same kiel kutime okazas dum la U.K., kune kantis la himnon "La Espero", la prezidanto Corsetti deklaris la kongresan malfermon.

Krom la rutinaj kongresaj laboroj, la Kultura plurvaria programo enhavis tre interesajn, ŝatatajn aranĝojn: pri instruado, movado kaj kulturo fare de internaciaj speturloj kiel Zlatko Tišljar, Carlo Minnaja, Davide Astori kaj aliaj kleraj prelegantoj.

Subĉele, ĉiu vespere okazis publikaj koncertoj kaj distraj momentoj kun la partopreno de bravaj kaj fame konataj internaciaj kantistoj kiuj multe gajigis la ĉeestantojn. La pola aktoro Georgo Handzlik prezentis plezurigan teatraĵan monologon pri Zamenhof.



Surstrate du foje okazis la "Internacia fiaro kun komerca eblo": unue en la urbo-centro kaj due antaŭ la kongresejo. Tia E-iniciato, nekutimis en niaj pasintaj naciaj kongresoj, efike ĝi okazis la unua fojo kaj bonsukcesis por plifortigis la informadon al la ekstera publiko. Krom la italaj kaj eksterlandaj E-Asocioj kaj grupoj, partoprenis ĝin ankaŭ la Bolonja Grupo "Tellini".

Ne mankis la junularagadoj, fakte la tre agema Boris Mandirola organizis vespere kaj nokte gajajn programojn kun muzikado, dancado, ludado kaj eĉ vingustumado!

La turisma programo enhavis allogajn ekskursojn en la historiaj urboj: Venecio, Treviso, Triesto kaj aliaj mirindaj lokoj kiel Palmanova, Aquileia kaj Grado.

La apud kongreseja strandoj kaj plaĝoj abunde favoris la kongresanojn por banado kaj sunbrunigado.

Dum la kongresaj tagoj ni ĝuis plezurigan restadon en internacia etoso kune kun novaj kaj malnovaj gekonatuoj, precipe kun la rusaj geamikoj ne longe konataj en S.ta Petroburgo kaj Moskvo okaze de la 26-a Rusia Esperanto kongreso kiun mi kaj aliaj bolonjanoj partoprenis antaŭ 3 monatoj.

La ĉj-ara 77-a Nacia kongreso tiel granda aranĝita kun tiel multnombraj partoprenantoj jam de longe oni atendis. Ni devas do pro tio gratuli la Organizan Komitaton kiu laboris senĉese kaj sukcese!

Sabaton, la 16-an oktobro je la h. 16,30
ĉe nia klubejo, strato Avesella 16,
TRADICIA AGADJARAMALFERMO 2010 /2011
Kaj je la h. 19,30
KOMUNA VESPERMANĜO
Ni invitas vin ĉiujn geklubanojn kaj geamikojn
(Vidu en la paĝo 5-a)

NOVA KONGRESO POR NOVA PROGRESO

impresoj de Renato Corsetti pri la kongreso en Lignano Sabbiadoro

Ĉio devas ŝanĝiĝi por ke ĉio restu sama. La ĉi-jara itala Esperanto-kongreso estas praktika apliko de ĉi tiu frazo el la itala romano *Il gattopardo*. La senco de tiu frazo en ĝia kunteksto estas, ke en difinitaj momentoj ĉio devas renoviĝi, por povi pludaŭri en la novaj sociaj kondiĉoj. La itala nacia kongreso de Esperanto havis siajn ekzistoproblemojn, kiel la kongresoj de aliaj eŭropaj landaj asocioj. En la 100 jaroj de ekzisto de nia Federacio, la plej bona periodo por la naciaj kongresoj estis la 50-aj kaj 60-aj jaroj.

Intertempe ĉio ŝanĝiĝis ĉirkaŭ ni. La vivo-ritmo iĝis pli freneza, pro kio malfacile homoj povas dediĉi tutan semajnon al Esperanto-kongreso.

Tion pruvas cetere la evoluo de kongresoj ankaŭ en Germanujo, Francujo, Nederlando, ktp. Ili reduktiĝis al kelkaj tagoj (iom pli longa semajn-fino) kaj foje eĉ al nur unu posttagmeza Ĝenerala Asembleo. Ankaŭ la itala kongreso en la lastaj jaroj emis reduktiĝi al 4 tagoj, 5 tagoj estis jam la escepto, dum multaj kongresanoj ĉeestis nur la sabaton kaj la dimanĉon.

La ekonomia situacio, se ni devas fidi je la statistikoj, pliboniĝis daŭre dum la lastaj 50 jaroj. Malgraŭ tio la persona percepto de la homoj estas, ke nun ĉio estas pli multekosta kaj pli malfacile akirebla. Se nun familio devus veni al Lignano el Romo per la vagonaro kaj resti tie dum unu semajno en hotelo, la elspezoj iĝus neelneblaj aŭ almenaŭ sufiĉe pezaj por mezklasa familio. Eble pro tio ankaŭ homoj, kiuj ne plu estas junaj, serĉas solvojn junularajn, kaj la aranĝoj de nia junulara sekcio iĝas ĉiam pli popularaj. La lastatempa ĝenerala krizo estas nur unu plia faktoro. 6 italoj je 10, ree laŭ la statistikoj, ne ferias ĉi-jare. Inter ili certe estos ankaŭ esperantistoj.

La entuziasmo pri la baldaŭa fina venko malpliigis samtempe kun la falo de la ideoj pri finaj venkoj en pli ĝeneralaj kampoj. Socialismo mortis kaj kapitalismo ne fartas tro bone. Nun restas la espero eviti la malaperon de la planedo. Samtempe kun la falo de tiuj "mesiaj" esperoj ankaŭ la fido je la triumfo de la bonuloj (esperantistoj) kontraŭ la malbonuloj (favorantoj de imperiaj lingvoj) malpliigis. Finfine nur en filmoj ĉiam gajnas bonuloj.

Ĉi tiu estas problemo pli ĝenerala kaj pli grava. La emo resti izolita kaj pensi nur pri propraj aferoj estas pli kaj pli ĝenerala, kaj pli kaj pli ofte oni ekscias pri ekzisto de esperantistoj, kiuj ne volas paroli kun aliaj vivantaj homoj sed nur kun sia komputilo. Tiuj certe ne venas al kongresoj.

Sed, kiel antikvuloj bone sciis, nenio vere mortas en la mondo sen samtempa naskiĝo de io nova. La nova mondo konsentas pli amasan lernadon de Esperanto ol iam ajn antaŭe en la historio. La kvanto da homoj, kiuj lernas nun Esperanton per la reto, estas impresa. Evidente ili ne plu sentas emocian ligan al sia loka instruisto kaj loka grupo, por ne paroli pri sia landa

asocio. Ili principe ne emas veni al kongresoj, sed se oni informas ilin kaj insistetas, ili foje venas, kaj ĉi tiu ĉijara kongreso pruvis tion.

Al la itala Kongreso en Lignano, apud Venecio, aliĝis 332 kongresanoj el 37 landoj, tamen kelkaj neeŭropanoj ne atingis la kongresejon ĉar ili ne sukcesis ricevi la vizon. La LKK, landa kongresa komitato, konsistis el Renato Corsetti, Bruĉjo Kasini, Laura Brazzabeni, Nicola Minnaja kaj Boris Mandirola. Vi komprenas el tio, ke la kongreso okazis en urbo sen Esperanto-grupo.

La kultura programo havis koncertojn de Jean-Marc Leclerc, alinome JoMo, Mikaelo Bronŝtejn, Georgo Handzlik, Amir de la grupo EspoDespo, Ĵomart kaj Nataŝa. Tuttagaj ekskursoj estis al Venecio, Treviso kaj Triesta Karsto. Prelegoj estis de Davide Astori, pri lingvistiko kaj Esperanto kaj pri homaranismo, de Katalin Kováts, pri instruado, de Zlatko Tišljár, pri eŭropa identeco, kaj de multaj aliaj. Grazina Opulskiene kaj Anna Löwenstein gvidis perfektigan kaj enkondukan kursojn de Esperanto per la rekta metodo laŭ Andreo Cseh.

Partoprenis la kursojn ankaŭ 9 junaj homoj, kiuj ricevis stipendion de Itala Esperanto-Federaĉio, por ĉeesti la kongreson.

Tio estas grava novaĵo. Temas pri la klopodo kunmeti la lernantojn retajn kun la normalaj esperantistoj. Pro la ĉeesto de multaj gejunuloj de la Itala Esperantista Junularo la afero sukcesis.

Michael Boris Mandirola organizis ĉiuvesperan kaj noktan interesan programon ĉefe por gejunuloj kun muzikado, dancado, ludado, gustumadoj de produktoj de la regiono kaj de la tuta Italujo kiel vinoj, fromaĝoj, dolĉaĵoj. La strandoj kaj plaĝoj apud kongresejo estis abunde uzataj por banado kaj sunbrunigado.

Apartaĵo de la ĉi-jara kongreso estis ankaŭ la KER-ekzamenoj kaj la KER-seminario, kiun mendis por siaj membroj la Itala Esperanto-Instituto. KER, kompreneble, estas mallongigo por Komuna Eŭropa Referenc-kadro rilate al lingvoinstruado kaj ekzamenado. Gvidis ĝin katalin Kováts kaj partoprenis ĝin ankaŭ la direktoro de la franca instituto.

Dum la seminario la reprezentantoj komparis siajn landajn sistemojn kaj analizis la novan eŭropan. Oni alvenis al la konkludo, ke en la estonteco la KER-ekzamenoj havu la rolon testi lingvajn kapablojn kaj doni ŝtatnivele kaj ekstermovade utiligeblajn atestilojn, dume la movadaj ekzamenoj (landaj kaj tiu de UEA-ILEI) celu kompletigi la sistemon per movadaj kaj kulturaj partoj. Ili fariĝas kvazaŭ daŭrigoj de la KER-ekzamenoj, kies diplomon estus utile enkalkuli je la koncernaj niveloj kaj je peto de kandidatoj ebligi antaŭigi per la KER-atestiloj la lingvan parton de la naci-lingvaj ekzamenoj. Dum la itala seminario en Lignano

submetiĝis al la ekzamenoj 10 membroj, inter ili la tuta estraro de la Itala Instituto, kompletigante la teoriajn studojn per vera praktika mezuriĝo kun celo propaŭte akriiri ekzamenstojn.

Nun ek al la venontjare kongreso. Aliĝoj estis jam akceptataj por la 78a Itala Kongreso, okazonta la 20an ĝis la 26an de Aŭgusto 2011, en Torino, unua ĉefurbo de la unuiginta Italujo.



Kongresa Inauguro: ĉe la podio Z.Tišljár, A.Grassini, R.Corsetti kaj B.Casini

EN KUBO LA 95-a UK...

de Franca Cipriani

La ĉi-jara U.K. , ekde la 17a ĝis la 24a de Julio 2010 en Havano, ĉefurbo de la socialisma respubliko Kubo, en kiu partoprenis pli ol 1000 esperantistoj el 60 landoj.

La temo traktita dum la evento estis "Interproksimigo de kulturoj" ligiĝita al la samtema Internacia Jaro, proklamita de UN kaj Unesko.

La kongresanojn gastigis Palacio de Convenciones, pli konata kiel Palco, konturita per tropika arbaro en la ĉirkaŭurbo.



Dum la solena inaŭguro, post la bonvenigaj salutoj fare de la Prezidanto Probal Dasgupta kaj reprezentantoj de la partoprenantaj landoj, la tuta aranĝo estis plezuriga kaj agrabla.

La tagoj estis vivigitaj per multaj aktivecoj: kunsidoj, prelegoj, lingvaj kursoj, ekzamenoj, movada foiro, vizito de libro servo, prezentado de novaj libroj,

Bravaj artistoj, kelkaj konataj en la esperanto-medio, gajigis la vesperojn per spektakloj kaj Koncertoj en urbaj teatroj. Menciinda la Internacia Koruso, kiu havis sian prezenton sur la podio precipe dum la Internacia Arta Vespero.

Multoblaj ekskursoj, gvidataj de lertaj ĉiĉeronoj, plivalorigis la programon. Krom la historiaj kaj artaj monumentoj de la Malnova Havano, oni povis admiri la belaĵojn de la marbordo: la mondfaman plaĝon de Varadero, la ravan lagunon de Guamà, la valon Viñales, la insulon Cayo Levisa, la fiŝistan vilaĝon Cojimar vizitita de Hemingway.

La bankedo okazis en la kongreseja restoracio "El Bucàn" en kiu kunmanĝantoj, interparolante kun fona muziko, gustumis tipajn nutraĵojn de la gastiganta lando.



Feliĉa motivo por la italaj samideanoj estis la renkontiĝo kun la ambasadoro, kiu aranĝis, dum agrabla interesa konversacio, riĉan bufedon.

Ĉe tiu okazo la diplomato plezure akceptis el la manoj de IEF-prezidanto Renato Corsetti esperanto-librojn, promesante interesiĝi pri nia lingvo, valora ilo por la interproksimigo de kulturoj de la tuta mondo.

...KAJ ANKAŬ LA 66-a I.J.K.

La 66-a internacia Junulara kongreso okazis ĉi-jare en Kubo ĉe Santa Cruz del Norte (24-31 julio), kun la partopreno de 180 gejunuloj el 35 landoj.

La organizantoj kaj volontuloj estis vere tre helpemaj kaj fine la problemoj estis solvitaj ĉar ĉio aspektis brile: ni troviĝis en eta paradizo-belega plaĝokun kolralifo, agrablaj kaj komforta kabanoj inter verdaĵo kaj palmoj Kontraŭe al la dense pakita UK-programo kun pluraj paralelaj programeroj, la programo en la IJK konsistis el multe da libera tempo, 2-3 horaj manĝopaŭzo kaj unuso-la elekteleco – se oni ignoras la daŭran alternativon de la plaĝo kaj naĝejo. Ĉiuj programoj, tagaj kaj vesperaj, okazis en unu salono-amfiteatro (kiu praktike situis tuj apud la naĝejo kaj trinkejo).

Ĉar ne estis enprogramita la inaŭguron, mi utiligis la unuan prelegon (pri Esperanto ĉe Interreto, E@I por saluti la kongreson nome de UEA-Estraro. Post la tagmanĝo oni povis partopreni salso-danckurson ĉe la naĝejo. Inter la salso kaj la vespermanĝo la organizantoj improvize aldonis mian prelegon pri "TEJO-kial kaj kiel" (kiun multaj kongresanoj petis vidi rete, do jen ĝi: www.slideshare.net/amriw/historio-de-tejo-2010).

Kvankam la prelego havis malfacilan konkurencon kun la naĝejo kaj trinkejo, fine aperis sufiĉe multaj aŭskultantoj - junaj kaj veteranoj.

(Amri Wandel. Esperanto/UEA,9-2010)

Riassumendo in italiano *gli articoli nelle precedenti pagine inerenti i congressi svoltisi nei mesi scorsi...*

Il 77° Congresso Italiano di Esperanto si è tenuto a Lignano Sabbiadoro dal 21 al 28 agosto. Tema del congresso è stato "Diritti linguistici nell'Europa multiculturale" ed è stata l'occasione per festeggiare il Centenario della Federazione Esperantista Italiana.

I congressisti sono stati numerosi: oltre 330 gli iscritti tra cui oltre la metà erano le rappresentanze estere di 37 paesi. Si può dire che è stato un vero congresso internazionale!

Il programma, ricco di appuntamenti, ha visto la presenza di varie personalità del Movimento esperantista i quali hanno trattato i diversi aspetti linguistici in Europa. Le serate sono state animate da ottimi musicisti di diversi paesi che hanno intrattenuto non solo i congressisti ma anche il pubblico di cittadini e villeggianti.

Il congresso nazionale del 2011 si terrà a Torino.

Il 95° Congresso Universale si è svolto quest'anno a Cuba. Dal 17 al 24 luglio l'Avana ha ospitato oltre mille esperantisti di 59 paesi. Il tema congressuale "Avvicinamento fra le culture" è stato trattato sotto vari aspetti da personalità della cultura internazionale.

Il programma ha riservato incontri, convegni, spettacoli, oltre alle visite turistiche che hanno permesso ai partecipanti di conoscere le bellezze di Cuba.

I congressisti italiani hanno avuto l'onore di essere ricevuti dall'ambasciatore italiano al quale hanno donato una pubblicazione in esperanto.

Infine, dal 24 al 31 luglio, a Santa Cruz del Norte, nelle vicinanze di Cuba, i giovani hanno tenuto il 66° congresso giovanile internazionale con la partecipazione di oltre 180 giovani di 35 paesi.

LA INSULO DE LA ROZOJ EN FILMO

de Alla Kudryashova

Kun apogaj priridoj kaj aplaŭdoj oni akceptis la prezenton de la dokumentara filmo far de Roberto Naccari e Stefano Bisulli *INSULO DE ROZOJ: LIBERO TIMIGAS*, kiu okazis la 9an de junio en bolonja Filmarejo (Cineteca) enkadre de ĉiujara "Biografilm Festival".



Inĝeniero Giorgio Rosa en du momentoj de la filmo- prezentado. Inter la gratulantoj, nia klubano Alla Kudryashova.



La film-montron ĉeestis ambaŭ reĝisoroj kaj ankaŭ la inĝeniero Giorgio Rosa, la ĉefrolulo de la filmo kaj de la tuta aventuro, kiu okazis antaŭ 40 jaroj en marakvoj apud Rimini.

La filmo evidentigis ke tiamaj italaj politikistoj kaj lokaj port- kaj urbestraro perceptis kiel "minacon" la ideon esti sendependa ŝtato sur artefarita insulo kaj oficialigi tie la artefaritan lingvon. Filmo daŭris ĉirkaŭ unu horo kaj fakte estis aro de intervuo de ĝis nun vivantaj "envoligitaj".

Menciindas, ke FEI (Itala E-Federacio) kontribuis al esplorkonferenco de reĝisoroj antaŭ la filmado kaj espereble daŭrigos kunlaboron por traduki la filmon al esperanto kaj eldoni ĝin en aparta versio.

Interalie estis intervuita por la dokumentaro ankaŭ la pastro Don Duilio Magnani, kiu rakontis pri konatiĝo de sinjoro Rosa kun Monaco Albino Ceccanti, kiu proksimigis la revanton al ideo de lingvo internacia.

Spektantoj estis mirinde aktivaj post la film-prezento kaj faris multajn demandojn al sinjoroj Rosa, Naccari kaj Bisulli: «Kie juna ambicia inĝeniero trovis monon por realigi sian revon? Ĉu li vere kredis je tiuj idealoj de libereco, tiam, kaj ĉu nun? Ĉu sufiĉis informo por prepari la scenaron kaj por filmi? Kial oni ne plu hezitas fari ion similan en Italio en nuntempe? Kio estas la lekcioj kiujn ni devus ellerni de tiu okazaĵo?»

La saman tagon pli frue en la korto de filmarejo okazis ankaŭ prezento de la samnoma libro *ISOLA DELLE ROSE. LA LIBERTÀ FA PAURA* de Giuseppe Musilli.

Raprezentanto de Bolonja E-klubo Alla Kudryashova havis eblecon persone saluti sinjoron Rosa kaj gratuli lin pro braveco rakonti lian personan historion al ondulo antaŭ la kamerao. Nun novaj generacioj de liber-

serĉantoj, utopi-aplikantoj kaj esperanto-parolantoj havas valoregan ekzemplon.

Ambaŭ la filmo kaj libro estos vendata en la librovendejoj. Por pliaj informoj vidu la ret-loko de la eldonisto: www.cinematica.it/news.html

In estate, durante l'importante Biografilm Festival della Cineteca di Bologna, è stato presentato il film documentario L'ISOLA DELLE ROSE: LA LIBERTÀ FA PAURA, dedicato alla vicenda della piattaforma costruita nelle acque al largo di Rimini tra il 1964 e il 1968.

L'ideazione fu dell'ingegnere bolognese Giorgio Rosa che intendeva così sperimentare tecniche di costruzione di piattaforme in mare.

Non mancarono critiche e impedimenti di legge che Rosa scavalcò proclamando l'indipendenza territoriale con tanto di statuto, francobolli, ristorante e l'Esperanto come lingua ufficiale.

La libertà fece paura e venne ingiunta la demolizione che l'ingegnere dovette sostenere a sue spese.

Il film ha un interesse storico notevole e per noi esperantisti ci riporta alla memoria un momento di grande pubblicità della Lingua Internazionale sia in Italia che all'estero.

Ricordiamo che l'ingegner Rosa fu in contatto con gli esperantisti riminesi, tra cui padre Ciccanti, che lo consigliarono sul modo di dare carattere internazionale alla sua iniziativa d'indipendenza.

Questa occasione filmica ha oggi riportato alla ribalta su giornali e su periodici la curiosa vicenda dell'Isola delle Rose: un'occasione anche per parlare di esperanto.

Durante la presentazione del dvd e del libro omonimo, l'ingegner Rosa è stato avvicinato dalla socia Alla Kudryashova che, a nome del Gruppo Tellini, lo ha invitato ad un prossimo incontro nella sede di Via Avesella per vedere insieme il film e commentarlo.

Per maggiori notizie: www.cinematica.it/news.html


NEL 1910 A BORDIGHERA...

Nel quadro dei festeggiamenti per i cento anni della Federazione Esperantista Italiana, il 23 e 24 Ottobre a Bordighera (IM) verrà organizzato un incontro di studi per ricordare l'attività esperantista di Clarence Bicknell (1842-1918), che nel 1910 fondò presso il suo museo di Bordighera il gruppo esperantista Antaŭen.

La manifestazione, organizzata dalla FEI e dall'Istituto Nazionale degli Studi Liguria, ha questo programma:

Sabato 23 ottobre, ore 15: saluto delle autorità e interventi di Fabrizio Pennacchietti ("Origine dell'esperanto e sua diffusione nell'Italia nord-occidentale con particolare riferimento alla Liguria"), di Andrea Capano ("Clarence Bicknell esperantista"), Elisabetta Vilisics ("Ecco la lingua amata da Clarence Bicknell"). Vi sarà una mostra dei documenti riguardanti l'attività esperantista di Clarence Bicknell, e un rinfresco nel giardino del Museo.

Domenica 24 ottobre, ore 10: Visita alla Casa Fontanalba di Clarence Bicknell a Casterino. La visita si svolgerà se sarà raggiunto un numero sufficiente di adesioni. Quota iscrizione: € 15,00. info: vilisics@libero.it



VIVO DE LA GRUPO ☆ VITA DEL GEB

NIAJ SEMAJNAJ RENKONTIĜOJ - I NOSTRI INCONTRI SETTIMANALI

Regulaj kunvenoj ĉiu merkrede kaj sabate - h. 16,30 - 19

Gli appuntamenti di ogni mercoledì e sabato. Tel. 333 427 9921

TEMPO D'AUTUNNO

L'estate è finita e le ferie sono archiviate. Ma permangono i ricordi esperantisti dei mesi passati. Soci del GEB hanno partecipato a vari convegni e congressi, da quello russo di San Pietroburgo a quello a nazionale di Lignano. Il 26 settembre abbiamo partecipato al consueto incontro settembrino organizzato dal Gruppo Esperantista Reggiano "La Kvarkatoj": una domenica piacevolissima per il clima, per l'ottima visita ai monumenti di Reggio Emilia e per il buon pranzo.

Ormai è autunno ed è meglio aprire l'ombrello. Per questa ragione la 6ª edizione di **Volontassociate** ai Giardini Margherita prevista per il 19 settembre è stata posticipata al 3 ottobre. Fra le 120 associazioni partecipanti, il GEB si è fatto notare con il proprio gazebo, decorato per l'occasione con striscioni e gigantografie, attraendo il numeroso pubblico presente alla giornata.

In tal modo abbiamo attuato la "Ago-Tago" proposta dall'UEA per portare l'Esperanto nelle piazze.



Ago-tago, okaze de partopreno al Urbo-Volontasocioj, Bologna, 03.10.2010

I nostri incontri in sede sono ricominciati al mercoledì e al sabato. Il prossimo importante appuntamento a cui non dovete mancare è quello di sabato 16 ottobre in sede per dare inizio all'attività 2010-2011 con un rinfresco seguito da una cena a cui certamente ognuno vorrà contribuire con qualche manicaretto.

Quella sera, saranno dedicati al socio Fabio Bettani due brindisi: il primo per aver conseguito durante il congresso di Lignano il prestigioso diploma internazionale a livello europeo C1 per la conoscenza della lingua Esperanto, e il secondo per l'ottenuta laurea in Geofisica presso l'Università di Bologna.

Nella stessa serata si parlerà delle recenti partecipazioni ai congressi.

GRATULOJN FABIO!

Nia juna vicprezidanto Fabio Bettani, dum la nacia kongreso en Lignano, brile sukcesis en la novtipa internacia ekzameno de UEA-ILEI, kaj akiris prestigian diplomon pri kono de Esperanto je la europa nivelo C1 - la dua plej alta en la referenckadro (la plej alta nivelo, C2, rezervatas por denaskaj parolantoj). La anoj de la Grupo Tellini varme gratulas lin ĉar li superis gravan provon pri lingva kapableco; pro tio sabaton la 16-an de oktobro ĉiuj ni kuniĝas kun li por kune festi kaj tosti.

I PROSSIMI INCONTRI

Programma dei nostri incontri settimanali in sede: al mercoledì pomeriggio lezioni del corso di 1° grado, e del *Paroliga kurso*. Al sabato "esperanto e non solo". Naturalmente l'appuntamento da non mancare è quello di sabato 16 ottobre.

2 ott. **El Esperanto-gazetaro.** Rassegna mensile della stampa esperantisra.

9 ott. **Video-filmo pri la 77a Itala E-Kongreso.** Presentazione video filmato del Congresso di Lignano.

16 ott. **Sabaton, la 16-an oktobro, je la h. 16,30 ĉe nia klubejo, AGADJARAMALFERMO 2010 /2011**
Kaj je la h.19,30 KOMUNA VESPERMANĜO
Ni invitas vin ĉiujn geklubanojn kaj geomikojn

Ore 16,30 Apertura attività 2010/2011
Ore 19,30 Cena sociale in sede.
Prenotazioni entro giovedì 14 ott.

23 ott. **En nia biblioteko, nova libro "Dek tagoj de kapitano Postinov", historia romano kun E-fono de rusa verkisto Mikaelo Bronŝtejn.** Presentazione del nuovo libro della biblioteca.

30 ott. **Pri la 26a Rusia E-kongreso en Sankt-Peterburgo.** Visione video del Congresso esperantista russo.

6 nov **El Esperanto-gazetaro.** Rassegna mensile della stampa esperantisra.

13 nov **Kvizludo por via plezuro.** Gioco con quiz in Esperanto.

20 nov **En nia biblioteko nova libro: Gramsci kaj Esperanto.** Ancora un nuovo libro nella nostra biblioteca: *Gramsci e l'Esperanto; quello che si sa e quello che si deve sapere.*

27 nov **Postkongreso en Moskvo.** Visione del video del postcongresso a Mosca.

SFIDA AI LETTORI

di Mario Amadei

La Pro-Loce di Medicina (BO) ha indetto sul proprio periodico un concorso fra i lettori dal titolo "Sfida ai lettori n°2: una cartolina un po' misteriosa da interpretare".

Si trattava di una cartolina spedita nel 1916 dal medico-nese Don Alosio Capelari, ad un «*Estimata sinjoro Angelo Perucchetti - Arona*», scritta in una misteriosa lingua. Le domande del concorso erano: 1) Qual è il vero nome del mittente?; 2) in quale lingua è scritto il messaggio?; 3) cosa viene comunicato al destinatario?

Ho riconosciuto subito che si trattava di una corrispondenza in esperanto e, consultando il libro di Luigi Tadolini *L'esperanto in Emilia Romagna, i luoghi, gli eventi, i protagonisti*, ho risposto dando alcune notizie interessanti su questo sacerdote che aveva costituito dal 1916 in poi un piccolo nucleo esperantista a Medicina.

GIORNATA DELLE LINGUE

La FEI ha partecipato alla manifestazione organizzata in occasione della Giornata Europea delle Lingue, proposta dalla Unione Europea in collaborazione con l'Università di Pisa e con gli enti locali delle provincie di Pisa e Lucca. La manifestazione si è svolta il 26 settembre, la mattina nell'Università di Pisa e al pomeriggio nella sala della Provincia di Lucca, con la partecipazione di oratori di notevole livello venuti da Bruxelles o italiani (in particolare Umberto Eco).

Sia a Pisa che a Lucca, la FEI era ben presente con un tavolo all'ingresso con materiale informativo e libri sull'esperanto che hanno trovato notevole interesse da parte del pubblico.

A parte alcuni consiglieri della FEI (Brazzabeni, Casini, Clerici, Corsetti) hanno partecipato numerosi esperantisti toscani.

La manifestazione non prevedeva praticamente la possibilità di interventi dal pubblico. Da parte degli oratori l'esperanto è stato citato da Umberto Eco, che praticamente ha riassunto le cose dette nel suo libro.

I contatti personali con lui e con gli altri oratori sono stati numerosi e, si spera, proficui per il movimento esperantista in futuro.

SFOGLIANDO IN BIBLIOTECA

Viene molto pubblicizzata da giornali e riviste la nuova lingua artificiale *GLOBISH* (contrazione delle parole global ed english). Il globish si impara in circa sei mesi: basta memorizzare 1500 vocaboli, utili per mettere insieme frasi brevi. Alcuni la definiscono la lingua degli aeroporti o delle stazioni per chiedere informazioni, ma risulta complicata per una vera conversazione.

Nella ricca biblioteca del GEB, c'è un libro del 1907, il "Corso Completo di Esperanto" in cui Dott. Alberto Dattari introduce la lezione di Esperanto riportando una sua conferenza dal titolo "Il problema d'una lingua internazionale e l'Esperanto".

In quella conferenza da lui tenuta all'Università Popolare di Firenze la sera del 14 maggio 1906, analizzò tutte le lingue artificiali dal 1600 al 1900 facendone il confronto con quella di Zamenhof. Nella lunga introduzione leggiamo tra l'altro: «Oggi l'Esperanto è il solo candidato serio alla lingua internazionale: ma fra uno, fra dieci, fra cento anni, quanti mai altri sistemi più perfetti di esso non saranno stati escogitati per sostituirlo? In verità l'apparire d'una nuova lingua è assai dubbio, giacché la creazione di un tutto omogeneamente organico e vitale è ben ardua cosa. Ciò potrà meravigliare coloro i quali pensano che per creare una nuova lingua basti inventare una quantità più o meno grande di vocaboli e nulla di più, senza un nesso qualunque fra di loro o un principio informatore. Ma l'impresa è ben differente! Il De Beaufront paragona chi deve creare una lingua al compositore che deve trarre una nuova melodia da un strumento musicale. Chi è ignaro dell'essenza dell'arte musicale, stimerà ciò la cosa più facile del mondo, credendo che basti toccare uno dopo l'altro i tasti del pianoforte o tutt'al più molti tasti insieme. Ma se questo ingenuo si metterà all'opera, vedrà allontanarsi inorriditi gli astanti ed esso pure nell'udire le ingrate dissonanze riconoscerà di essersi ingannato di assai, perché la musica non consiste davvero nel far risuonare delle note una dopo l'altra o anche più note insieme. Lo stesso accade a chi deve inventare una lingua nuova; iniziare la cosa, darle un nome sonoro, vantare ai



quattro venti i meriti straordinari, tutto ciò è molto facile; ma portare il lavoro a compimento e creare qualcosa di armonicamente omogeneo, d'organico, di vitale e tutto d'un sol getto, è immensamente difficile.»

Il libro è conservato anche nella Biblioteca Esperanto di Massa.

DANKON AL T.E.A.

La Triesta Esperanto Asocio trovis tre interesan propagandan poŝtkarton, eldonita de Achille Tellini, komence de la jaro 1900.

Supre de la poŝtkarto, itallingve: «Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio T.E.K.A. nombras pli ol 500 anojn en ĉiuj mondaj partoj. Membrigu. Petu la jarlibron por 1909 (1 liro) kaj semipagano ekzempleron de la monata organo "Voĉo de kuracisto" al S-ro H. F. Adolf Thalwitzer.»



SED KIU ESTIS TELLINI?

El la libro "Il movimento esperantista in Friuli" de G. Martines (Udine):

«Li naskiĝis en Udine en 1866. 21-aĝa, li diplomiĝis pri Natursciencoj ĉe la Universitato de Torino kaj tuj poste iris en Romo kiel asistanto de geologia profesoro. Tie li laboregis en la sektoroj pri paleogeografio, glaciologio kaj romia geologio kaj publikigis serion da sciencaj eseoj. Destinata al elstara universitata kariero, tamen en 1893 pri ĉio li rezignis kaj preferis reiri al Udine, kie li ricevis la katedron pri Natursciencoj ĉe la Reĝa Instituto. En 1904, pro privataj kialoj, li forlasis instruadon kaj donacis sian riĉan sciencan bibliotekon al la Respubliko de San Marino, dum al la Muzeo pri Naturhistorio en Triesto li transdonis trovaĵojn de sia scienc-vojaĝo farita en Eritreo.

Tiam li ekdediĉis sin al studado de romanĉaj filologio kaj literaturo kaj de Esperanto.

Esperantisto ekde 1901, li multon skribis kaj publikigis internacilingve. Li tradukis verkojn de S. Pellico, G. Rajberti kaj I. Nievo; kompilis la gvidlibron pri Ravenna kaj plenan E-Italan vortaron.

Fine en 1908 li translokiĝis en Bologna, kie en la jaro 1912, li fondis la Italan Katedron de Esperanto, kiun li estris ĝis 1922, kaj Bolonjan grupon. Celoj de la Itala Katedro, laŭ liaj principoj, estis elekti taŭgajn instruistojn, organizi kursojn kaj ekzamenojn, propagandi pere de sciencoj kaj prelegoj. Lia agado, tiel diligenta kaj konstanta, ricevis la aproban konsenton, per letere, de Zamenhof mem (1914).

Li helpis la eldoniston Antonio Paolet el San Vito al Tagliamento, kiu interalie eldonis la italan organon "L'Esperanto". Dum la 1-a mondmilito li peradis la korespondaĵojn inter la militkaptitoj, internigitoj kaj iliaj familioj.

En 1927 Tellini reiris al Udine kaj tie li komencis komparan studon inter la esperanta kaj friula leksikoj kaj, en 1935, publikigis esperantan gramatikon, kun vortaro kaj ekzercoj, por la romanĉoj de Friulo.

Oktobro 1938 prof-ro Achille Tellini, postlongdaŭra kormalsano, mortis en Udine. Li, grandanime, testamentis duonon de siaj havaĵoj favore al Seminarioj en Udine kaj Gorizia, por ke oni starigu katedrojn pri esperanto kaj pri propagando de la friula dialekto.»